# VOĈDONREZULTO de la KOMITATO de ILEI, marto 2011

Jen la rezulto de la fizika voĉdono organizita en januaro 2011 kun limdato de la 15a de marto, 2011. La apogaj dokumentoj por la voĉdonoj estas afiŝataj en la ILEI-retejo ĉe www.ilei.info. Entute venis 26 validaj voĉdoniloj, el komitato kun 53 anoncitaj membroj. Kvroumo en ĉeesta kunsido estas triono de la anoncitaj membroj, por poŝtaj voĉdonoj ĝi ne estas aparte specifita.

1. La komitato akceptu la Regularon pri Reta Voĉdonado, kiel akceptita en Matanzas.

   26 JES

2. La komitato akceptu la revizoritajn spezokonton pri 2009 kaj ĉiujn eŭro-bazitajn fondusojn.

   22 JES 2 NE 2 SINDETENOJ

3. La komitato provizore akceptu la raporton pri la svedkrona Fonduso Erika Linz kaj la bilancon por 2009, kies eŭro-bazita parto estas revizorita; definitiva akcepto okazu post sveda revizorado.

   22 JES 4 SINDETENOJ

4. La komitato akceptu la aktualigitan interkonsenton kun UEA, kiel akceptita en Matanzas.

   25 JES 1 SINDETENO

5. La komitato konfirmu la decidon el Matanzas pri la senŝarĝigo de la Estraro por 2009.

   22 JES 4 SINDETENOJ

6. La komitato akceptu la buĝeton 2011, kiel proponata de la estraro.

   23 JES 3 SINDETENOJ

7. La komitato akceptu la aliĝpeton de la landa sekcio en Serbio.

   23 JES 3 SINDETENOJ

8. La komitato akceptas ke proponata sekciestro por nova sekcio devas membri en la Internacia ILEI por la jaro de la peto kaj unu antaŭa jaro (ne du.)

   23 JES 2 NE 1 SINDETENO

9. La komitato akceptas ke proponata reprezentanto por fondota sekcio devas membri en la Internacia ILEI en la jaro de la peto pri listigo (ne aldone en la antaŭa jaro.)

   20 JES 3 NE 3 SINDETENOJ

10. La komitato precizigas la ILEI-Regularon, ke la postulataj 5 membroj necesaj por sekcia aliĝpeto devas esti membroj de la Internacia ILEI en la jaro de la pet-ektrakto. La pluvivo de sekcio postulas ĉiujaran anonciĝon de almenaŭ kvin internaciaj membroj.

    23 JES 3 SINDETENOJ

11. La komitato akceptu la estraran proponon, ke la mandato de la nuna komitato, enoficigita en Krakovo, finiĝu en la 31ª de marto, 2012, tiel ke nova komitato oficu en la Konferenco 2012.

    22 JES 1 NE 3 SINDETENOJ

Administris la voĉdonon: Małgosia J. Komarnicka, Pollando. Sekciestroj kaj komitatanoj ricevis de ŝi pli detalan raporton, interalie listigante la landojn el kiuj alvenis voĉdonoj.

Ni dankas al la respondintoj, kaj alvokas al la aliaj pli aktive partopreni en la liga demokrateco kaj kundecidado!

SMG, Bp. 6an de aprilo, 2011